

Nederlanda Katoliko

Maandblad, Officieel Orgaan van den Nederl. R.-Kath. Esperantistenbond „Nederlanda Katoliko”, gevestigd te 's Hertogenbosch, opgericht 29 Augustus 1909, bisschoppelijk en koninklijk goedgekeurd.

Ĉion per amo, nenion per forto. (*S. Franc. de Sales*).

| | | |
|---|--|---|
| Hoofdredacteur : | E S P E R A N T I O | Redactie en Administratie : |
| J. N. J. Smulders, Arts te Udenhout. | | H. Damen, St. Crispijnstr. 57, 'sBosch. |
| Abonnementsprijs, | | Advertentieprijs, |
| p.jaar, franco p. post, bij vooruitbetaling | | per regel 10 cts. |
| Nederland (niet-leden). . . . f 1.— | | Bij geregelde plaatsing aanzienlijke korting. |
| België Sm. 0,87 = - 1,06 | Voor inlichtingen wende men zich tot de administratie. | |
| Andere landen (aliaj landoj) | | |
| Sm. 1,04 = - 1,24 | | |
| Afzonderlijke nummers 10 cent. | | |

PACO.

Kristnaska Meditado.

La plej grandvalora trezoro sur la tero estas la paco. Tial ankaŭ kantis la anĝeloj ĉe la manĝujeto de la ĵus-naskita Savonto: „Honoro al Dio en la altecoj kaj paco sur la tero al la homoj de bona volo“! Lin salutis ili kiel la Reĝon del'paco. La pacon, Li alportis, ĉar Li venis por reamiki la homon kun Dio; la pacon Li predikis, ĉar Li lernis al homaro kredon kaj ekzerci tion, kio sola povas alkonduki al la vera paco, la pacon fine Li ĉiam deziris al la homoj: „Mi lasas al vi la pacon, pacon mian Mi donas al vi“, kaj la unuaj paroloj, kiujn al siaj apostoloj Li diris post sia el la tombo sinleviĝo, estis ĉi-tiuj: „Estu al vi paco“!

La paco, dolĉa frukto de l'amo, estis ankaŭ ĉiutempe la eco de l' Jezua Eklezio. Kiel firma estis la paco

kaj interkonsento ĉe la unuaj kistanoj! „Rigardu“ diris la idolanoj, „kiom sin interamas tiuj kristanoj“!

Ĉiam floradis en la Sankta Eklezio la paco kaj harmonieco; kaj, se je la nunaj tempoj kun bedaŭro ni eksperimentas, ke multe da homoj sin fortremigas de la spirito de malunueco, de disputado kaj de venĝemeco, tiam ĉi-tio ne estas riproĉinda al l'Eklezio de Jezuo, sed al la spirito de malpaco, la demono, kiu kun siaj kunuloj volas malaperigi de nia tero Eklezion kaj pacon.

Ofte dum la sankta kristnaskotempo ni genufleksu antaŭ la manĝujeto de l'pacreĝo, por ke ni firmigu en la vera de l'kristaneco spirito, kiun Kristo iam feliĉproklamis, dirante: „Feliĉaj la pacemuloj, ĉar infanoj de Dio ili estos nomataj“. Kaj ni, karaj gefratoj

samideanaj, ni, Esperantistoj, preĝu fervore kaj konfidplene, por ke
„tra la vasta globo de la mondo,
„oni aŭdu ĉie pri frateco,
„kaj pri unu familia rondo,
„kunligota per la amikeco”.

Jes, estu efika la preĝo, kiun metis al ni sur la lipoj ne nure, sed ankaŭ en la koro nia, precipe al ni, Nederlandanoj, neforgesebla Pastro van der Wal formortinta, kiam li al ni donis sian kvazaŭ kredtestamenton en la „Himno Katolika” :

„ĉiam paco, ĉie nur la amo...”

Preĝu ankaŭ, por ke de nia tutmondlingva kampo la malpaco, la malunueco restu for: por ke ĉiuj kunlaboru al la unu Esperanto, nome la Zamenhofa, laŭ la sama vojo: unueco ja estas fortego.

De el sia manĝujeto Jezuo nin instruas, ke la interkonsento por ni estas devo sankta. „Ekvidu”, Li ŝajnas al ni diri, „kiel terure la homoj estas ofendintaj sian Dion, kaj tamen Dio faris la unuan paŝon de repacigo, Dio unue etendis la refratigantan manon, vin liberigante per si mem de el la demona sklaveco kaj de el la morto eterna. Kaj vi ne volus pardoni al via proksimulo, kiu nur kelkajn vortojn maldelikatajn al vi diris, eĉ se insulte je vi li sin kondukis?”

Sed pli multe ankoraŭ instruas al vi Jezuo. Jam je sia naskiĝo Li kore sed samtempe kun sankta graveco al vi diras: „Se vi volas esti mia lernanto, amu vian proksimulon, bonfaru al la vin malamantoj, pardonu al viaj ŝuldantoj”.

Se do ni ne pardonas la malpravon al ni faritan, se ni estas avidaj je disputo kaj venĝemeco, tiam ni forkuras de la paco, ni ne estas veraj sekvantoj de Jesu-Kristo.

Kaj kial ne?

Kio estas kristano? Li estas infano de Dio. Per la liberiĝo, diras sankta Johano, ni estas reakceptitaj kiel infanoj. Sed ĉu estas ankoraŭ familiano tiu, kiu malamas siajn fratojn, kiu estas

venĝema kontraŭ ili, kiu ne volas pardoni la ofendojn al li faritajn reale aŭ nur ŝajne?

Kio estas kristano? Frato de Jezuo Kristo, plie ankoraŭ, membro de Lia sankta Korpo, kiel sankta Paŭlo diras. Sed ĉu ni ne vidas ke la korpomembroj kunlaboradas ĉiuj al unu fino? Kion vi dirus de mano, kiu ne volas tion, kion volas la aliaj membroj? Tiel ankaŭ ni ĉiuj devas kunvivi en paco kaj harmonieco kiel fratoj de Jezuo, kiel membroj de unu korpo.

Kio estas kristano? Li estas la templo de la Spirito Sankta, kiu estas spirito de amo kaj harmonio. Sed ĉu povas loĝi tiu-ĉi Sankta Spirito en koro, kie regas la malpaco? Vi vidas, ke sen la paco, sen la harmonieco vi ne estas veraj sekvantoj de Jezuo, nia pacreĝo, kaj nur kontraŭvole vi povas genufleksi apud la manĝujo de l'ĉiela Infaneto por tie ĉerpi la benaĵojn de la liberiĝo.

Se do estas inter vi iuj, en kiuj regas la spirito de malpaco, kiuj vivas jam longtempe en malamo kontraŭ via proksimulo, venu, genufleksu apud la manĝujeto por demandi forton kaj kuraĝon, bezonatajn por venki vian honorvunditan egoismon. Releviĝu kaj iru kuraĝe al via malamiko, kiu eble ankaŭ deziras reamikiĝi, sed la kuraĝon ne havas.

Tiam Kristnasko ree estos por vi vera ĝojofesto. Tiam ankaŭ al vi retendos Jezuo siajn braketojn, vin premos al sia Dia Koro kaj al vi ĉion pardonos.

Tiam ree estos via la ĉiela paco promesita al la homoj de bona volo.

Tiam ankaŭ vi al vi gajnos la koron de via malamiko. Ĉar ne per venĝemeco kaj kolero, sed per pacienco kaj indulgo oni venkas sian malamikon.

Unuvorte vi tiam ree vin sentos feliĉa, ĉar feliĉo kaj paco estas nedisigeble kunligitaj.

L. MARREVEE S.C.J.

PRISKRIBAĴOJ EL LA TERO SANKTA.

Je la proksimiĝo de Kristnasko mi senvole repensas al la festa tago, kiun mi pasigis sur la loko de la Naskiĝo de Kristo kaj je kiu mi ĉeestis ĉiujn solenaĵojn, kiuj des pli postlasis daŭrigan impresadon, se oni estas en la proksimaĵoj de tiuj sanktaj lokoj, tiel plenaj je la plej religiaj memoroj.

Sed kvankam en Betlehemo la Naskiĝa festo estas la granda festo, kiu venigas multnombrajn pilgrimojn, tamen ankaŭ la antaŭtago de la festo al-tiras amason da homoj. Ĉar je tiu tago la latina Patriarko — mi diras latina, ĉar estas ankoraŭ greka-hereza kaj armena-hereza — faronte la noktajn ceremoniojn, eniras solene en Betlehemo. Tiu eniro famiĝas kiel la oficiala vizito patriarka eĉ en la plej malproksimaj landoj.

Antaŭ ol mi parolos pri la ĵus dirata festo, mi devas komenci per tiu grandioza eniro; tial ke ĝi ĉiam estas nomata samtempe kun la Naskiĝa Festo, kaj faras kune nur unu grandan neforgeseblaĵon.

Estas la 24-a de Decembro. Jam multaj piedire eliris la sanktan urbon por iri al Betlehemo.

Finiĝinte mian tagmanĝon, kiun mi tial plifruigis, ankaŭ mi preparis min kaj direktiĝis al la placo antaŭ la pordego de Jaffa, kiu estas la alvenejo kaj forirejo de la veturiloj, veturadantaj inter Jeruzalemo kaj Betlehemo. Kiam mi tie alvenis, estis la unua posttagmeze kaj je la tria devas alveni la Patriarko.

Hazarde kaj ankaŭ feliĉe, mi renkontas trikonatulojn kaj kune ni serĉas veturilon.

Serĉi, mi diras, ĉar ne estas facile eltrovi unu, kiu al la komforteco kunigas la purecon; ĉar ĉiam ili estas kovritaj je polvo. La feliĉo nin helpas kaj baldaŭ ni eksidiĝas en ĝi kvarope,

post kiam ni interkonsentis kun la veturigisto pri la veturprezo.

Komence la ĉevaloj galope kuras sen vipobato, ne tiom pro bonvolemo ol pro la malsupreniriĝo de la tero; ĉar post duona horo, veninte al monto, sur kiu nun iras la vojo ili malrapidigas sian kuron, tiel ke la veturigisto devas sentigi sian vipon al la grasa dorso de tiuj bestoj. Krom tio, ke la vojoj estas lacigantaj ilin, la veturigistoj estas senkompatemaj kaj volas per siaj batadoj faligi ilin teren pli volonte, ol toleri, ke ili mallaciĝu aŭ malrapidiĝu.

Sur la supraĵo de l'monto ni raviĝas pro la panoramo de Betlehemo, kiu belege disfaldiĝis en la valo.

La brungrizaj domoj, konstruitaj sur deklivoj kaj supraĵoj de la malebenaĵoj, la plataj tegmentoj, ĉioĉi, lumigita per la hela suno, brilante al sennebula ĉielo, eksentigas al fremdulo, ke li sin trovas en la orienlando.

Intertempe ni estas veturadantaj kaj ĉirkaŭrigardante per scivolomaj okuloj, subite ni rimarkas neordinaran malgrandan konstruaĵon. Informiĝinte pri tio, ni ekscias ke ĝi estas la tombo de Raĥelo, kiun ŝia edzo Jakobo konstruis sur la loko, kie ŝi mortis. Mi ne estis forgesinta ankoraŭ, ke la Biblio parolas pri tio-ĉi; disfoliiĝinte ĝin ni mire ekvidis, ke ĝi donas la saman lokon proksimume, laŭlonge la vojo inter Jeruzalemo kaj Betlehemo. Ankoraŭ ni vidis poste, ke multaj Judoj kaj precipe Araboj, kiuj pasas tie, preĝas iom da tempo en la tombo.

Jam ni vidas de malproksime la unuajn domojn pro kio ni multe ĝojas, ne nur por vidi fine la deziratan lokon, kie Kristo venis teren, sed ankaŭ pro la granda lulegado de la veturilo sur la malebenega vojo, kiu cetere sufiĉe ofte laŭlongiĝas danĝere pro-

fundajn valojn. Tiu vetura movado kaŭzigis al mi preskaŭ marmalsanon, almenaŭ malagrablan senton en la ventro kaj la kapo.

Fine ni enveturas la urbeton, tra mallarĝegaj stratoj, ĉi-tie kaj tie superarki taj por subteni la klinemajn murojn. Apanaŭ la veturilo povas pasi, kaj precipe nun estas neeblege veturi ĝis la celo pro la amaso da homoj.

Ni ĉesigas la veturadon kaj piedire ni sekvas la homamason, kiu moviĝadas al la vendeja placo.

Ne senpenade ni alvenas tie. Ĝi troviĝas antaŭ la grotaj preĝejoj kaj jam estas plena je popolo. Ĝi ŝajnas esti en senfina moviĝado.

Dise kuradas diversnaciaj kaj enlandanaj: Turkoj, Araboj, ĉiuordenaj kaj ĉiureligiaj pastroj. Fortan kontraston ni ekrimarkas inter la malsimilegaj kostumoj.

Eksterlandaj gevoj, vestitaj per eŭropaj vestaĵoj marŝas inter Turkoj, kiuj portas ruĝajn tarbuŝojn sur la kapo kaj vestiĝas per larĝegaj pantalonoj; Beduinoj en malhelbrunaj burnusoj kaj kapkovritaj je nigraj kamelharaj ringoj, kiuj devas tenadi sur la kapo blankan tukon kiel sunŝirmilon, troviĝas apud turbandigitaj Araboj en longaj manteloj. Sed precipe la karakteriza vestiĝo de la Betlehemanoj, pli precipe iliaj kapkovriloj altiras la sciivolemajn fremdulojn. Rilate la formon, tiuj kapkovriloj ŝajnas esti turnigitaj florpotoj, tiel ke la malferma parto restas sur la kapo. Tiuj turetoj estas kovritaj je kolormiksaĉaj tukoj, faldiĝe pendantaj sur la dorso.

Samkoloraj estas iliaj supraj vestaĵoj, dum la juvoj estas faritaj el dika helblua tolaĵo.

Sed ne nur la vasta placo estas plena je homoj, ankaŭ la plataj tegmentoj vivas pro la popolo. Eĉ sur la ĉirkaŭa ejo de la minareto, de kie la muezino sonorvoĉe vokas la mahometanojn al la preĝo, ne restas plua loko.

Tiel eble plej bone mi antaŭiĝas tra la popolaron, por ekstaradi sur oportuna loko. Ĉiuj dezirege atendas la alvenon. Subite de la tegmento de la turka militistejo deko da bloviloj aŭdigas sian fanfaronan sonon; estas signo ke la Patriarko alproksimiĝas. Samtempe militistoj turkaj eliras la militistejon por fari inter la popolo lokon formante du vicojn, ĝis la enirejo de la preĝejo kaj okupante preskaŭ la tutan longecon de la placo.

Ankaŭ aperas la pastraro kaj la seminarianoj de la latina patriarkejo, la Franciskanoj kaj aliaj pastroj, ĉiuj vestitaj per blankaj ĥorvestoj kaj portantaj brulantajn kandelojn. Unu el la seminarianoj, la nura holandano el ili, antaŭeniras kaj portas la arĝentan krucon, eble pro lia granda figuro; alia lin sekvas, svingadante l'odorfumigon. Ili eliras, ricevonte solene la Patriarkon.

Ĉiuj okuloj estas direktiĝantaj al unu nura punkto, malproksima kurbaĵo de la vojo.

Jen fine galope alvenas turkaj kavalerianoj, kies pafiloj, kiujn ili tenas per la mano, brilas pro la suno.

Ili estas la antaŭgvardio el la sekvantaro de la Patriarko.

Poste ekaperas la veturiloj, meze de ĉevalirantaj janitsaroj: fine ankoraŭ kavalerianoj fermas la procesion.

Ni devas ankoraŭ atendi pacience kelke da tempo.

Dume ni aŭdas plezure la preparadojn de la Araboj kaj aliaj orientuloj, kiuj sin komprenigas pli per siaj vivaj gestadoj ol per siaj paroloj. Subita entuziasma ekkrio el miloj da ŝoj, kian nur povas eligi la orientuloj el siaj ekbrulemaj animoj, estas surprizinta el la amaso. La veturiloj estas alvenintaj kaj ekhaltas.

Afabla Maljunulo purpurvestita elveturiliĝas. La boneco brilas sur lia mieno, kiam li benas la popolojn. La longa duobla vico da militistoj prezentas la pafilojn; iliaj oficiroj eksintenadiĝas antaŭ ili.

Malantaŭ la militista vico la homoj penadas kaj sin interpuŝas por atingi la unuajn lokojn de kie ili povas rigardi pli proksime la Patriarkon.

Ĉirkaŭigita de sia pastraro, tra l'ordorfumo, kiu lin estas alsvingata, li marŝetas al la preĝejo.

Daŭrade lia mano estas levita por beni dekste- kaj maldekste.

Kantante oni eniras la preĝejon kaj ankaŭ ni rapidiĝas trapasante la pordon. Ne sen ia malfacileco mi povas eniri; ĉar la pordo estas malgrandega, tiel ke mi estas devigata fleksi min preskaŭ teren. Ni troviĝas nun en la preĝejo kiun konstruigis la patrino de Sankta Aŭgustino.

Ĝi estas tute neprovizita; tamen ĝi konservas ion de la frua beleco.

Du vicoj da ruĝmarmoraj kolonoj subtenas ĝin, kaj sur la muroj ankoraŭ

malmulte estas videblaj kelkaj mozaikoj.

Sed ni ne nun volas ekhalti por rigardi pli detale: ni sekvos la homan fluon, kiu kune kun la patriarko eniras por havi bonan lokon dum la vesperaj preĝoj.

Tra malfermitaĵo, fermita nur per dika kurteno, ni venas en alian preĝejon. Tiu-ĉi estas pli provizita; tapiŝoj kuŝas sur la ŝtonoj kaj abunde estas pendigitaj arĝentaj lampetoj.

Ĝi estas preĝejo parte apartenante al la Armenoj, parte al la Grekoj kaj en ĝi troviĝas la ŝtuparo, kiu kondukas en la naskiĝan groton, super kiu estas konstruita la preĝejoj. Sufiĉe frue ni venas en la katolika preĝejo de la Franciskanoj.

A. H. M. KOOLS.)

Daŭrigota.

Kvar semajnojn en Esperantujo.

II.

Sed fine, mi nekomencis vojaĝon por dormi, tion mi povas fari ankaŭ hejme. Je la naŭa kaj duono mi iris al la akceptejo por aniĝigi min. Tre fiere mi metis la kongresinsignon sur mian bruston, por ke la tuta mondo povu vidi ke ankaŭ mi estas unu el la plej deligentaj homoj de l'mondo. Mi konatiĝis kun tiel multe da gebonuloj ke estas tute ne eble diri nomojn. Grupe ni iris al la preĝejo „Trinitato“ por demandi al Dio la benon pro nia movado. Je la tria ĉiuj ĉeestis por viziti la malfermkunsidon; tiu kunsido estas ĉiam unu el la plej interesaj. La salonego en la tre bela kongresejo — la urba kazino — estis tute plena jam longe antaŭ la tria. Admirinda estis la tre lukse ornamita scenejo. Granda blanka ŝildo kun verda ŝtelo staris en mezo, kaj estris ĉion. Ĉu ne estis la festo de l'verda ŝtelo? Unuflanke oni vidis tre luksan standardeton, speciale pre-

parita por ĉi-tiu kongreso, kiel donaco al nia esperantuja reĝo. Jen li envenis! Ho, kiel entuziasme estis la akceptol Vere, reĝo ne povas esti akceptata tiamaniere de siaj plej fervoraj subuloj. La esperanta popolkanto tondris tra la salonego akompanita de artista orgenludo. Ho, kiel unu estis la tuta anaregol Estas preskaŭ nekredeble ke en tiu salonego kunestis personoj el tiom da diversaj landoj. Ĉiuj parolis unu lingvon ĉiuj volas saman celon, la bonfartron de Esperanto. Nun venis la personoj el ĉiuj mondpartoj por transdoni al ni la salutojn de niaj samideanoj kiuj laŭspirite estis kun ni, por festi la progresojn de nia lingvo. Tuj ni montrus tiun progreson al la Berna popolo! Ekstere atendis nin la naciaj standardoj post kiuj ni tramarŝus la urbon. Ankaŭ la nederlanda trikoloro estis inter ili. Ĝi estis tute nekonata de la ĉirkaŭstarantoj, kaj kiam ni res-

pondis ke ni estas nederlandanoj ili tute ne komprenis nin, sed kiam ni diris, „ni estas holandanoj“, la respondo estis: Ah, Holando, la bona Holando, jes, jes. Post la marŝado tra la urbo ĉiuj kongresanoj elektis sian propran vojon. Mi foriris kun aliaj por vidi la belaĵojn de l'urbo.

Je la naŭa de l'25a de Aŭgusto mi ĉeestis la kunvenon de la katolikoj pri kiu oni povas legi en la internacia gazeto „Espero Katolika“. Ĝi okazis en la universitato, tre bela konstruaĵo lokita sur altaĵo, de kiu oni povas pririgardi la tutan urbon kaj ĉirkaŭaĵoj. De ĉi-tie mi vidis la montaron de Svisujo, la Alpoj. Promenante kaj ĝuante ni pasigis la tempon ĝis la malfermkunsido de U.E.A., kiu estis tre bone vizitata kaj interesa. La vesperhorojn ni pasigis en „Ingere Enge“, restaŭracio ekster la urbo.

Tie-ĉi oni beligis la ĝardenon per lampionoj kaj gvirlandoj je nia honoro. La muzikistoj ludis diversajn naciajn himnoj. Ni do tre bone amuzis nin. Diversaj personoj alvenintaj en nacia kostumo, kun ni tramarŝis la tutan ĝardenon unu post la alia por propagandi Esperanton inter la neesperantistoj kiuj multnombre ĉeestis la koncerton. Tute kontenta mi iris hejmen kaj dormis bonege ĝis la sekvonta mateno. Kiel katolikino mia unua agado estis iri al la preĝejo por ĉeesti la funebra Diservon por nia karega mortinta patro Abato Richardson. Poste rakontis sinjoro Colas al ni ion pri lastaj horoj de l'vivo lia kaj donis al ni preĝbildon surhavante portreton. Nun estis nia devo iri al la kongresejo por ĉeesti kunvenon.

Mi tute ne plu povas rakonti pri kunvenoj, ĉar mi tute forgesas kion oni pritraktis. La promenado post la kunveno mi faris en societo de italaj gesamideanoj. Ni vizitis restaŭracion apud la bordo de l'rivero „Aar“, la ursejon, kaj posttagmeze

la historian muzeon. La ursejo estas tre amuziga loka, kie ĉiam estas vizitantoj. La ursoj tute ne ĝenas sin por la homoj kiuj pririgardas ilin. De l'muzeo, en kiu ni ne povis resti sufiĉe longe por bone vidi ĉion, mi iris al la universitato por ĉeesti kelkajn fakkunsidojn.

Mi eniris diversajn, sed neniun interesis min sufiĉe por resti. Tial mi vizitis la naturhistorian ekspozicion kiu estis organizita en la universitato, por la esperantistoj. La ĉeestado de l'teatraĵoj forrabis al mi la vesperon. Oni ludis „Patreco“(n) kaj „Ginevra“(on). La unua estis preskaŭ ne aŭdebla tiel abomena estis la elparolado de l'ludistoj.

La dua estis multe pli bona, sed mi estis jam tro laca de la aŭskultado de Patreco.

La sekvinta tago alportis al ni kumanan festtagmanĝon en la kongresejo mem. Ĝi daŭris sufiĉe longe, sed la manĝado estis bonega.

Poste ni iris por fotografi nin ĉiuj kune. Sed kie? Unue al la eniro de l'historia muzeo. Ne estis loko por ĉiuj. Nun al granda herbejo laŭlonge la rivero, kaj tie oni sukcesis. Kaj kio nun? Estis ankoraŭ multe da tempo antaŭ la komenco de l'koncerto. Mi preferis promenadon en la freŝa aero, kaj jam baldaŭ mi trovis kelkajn, kiuj deziris same. La amuza komitato surprizis nin dum la vespero per tre interesa orgenludo. Mi neniam aŭdis ion kio similas al tiu ludado. Ne unu momento mi enuigis min kaj kun granda bedaŭro mi rimarkis ke la tempo tiel rapide forflugis. Ni devis iri hejmen por dormado, ĉar la 28an ni ekskursus al Interlaken. La vagonaro kundukis al la Brienza lago kaj ĉi-tiun lagon ni travojaĝis ŝipe.

En la vilaĝo treege belega, ni tagmanĝis. Post la tagmanĝo ni bezonis nian tempon por suprengrimpi monton. Ni elektis la monton „Harden“ kies alteco estas 1325 metroj.

Mia amiko kunportis bonan bastonon, sed mi ne bezonis bastonon havante bonan kondukanton. Tute kuraĝaj ni komencis la suprengrimpadon, sed baldaŭ komencis la svitado. Estis terure varma, sed sunbano estas saniga. Ni daŭrigis nian vojon ĝis la plej alta pinto, haltante de tempo al tempo por ripozi kaj pririgardi la belegajn panoramojn.

Kiel nenio estas la homo en tiu majesteca naturo. La tutajo ŝajnis ludskatolon infanan. La vagonaro similis al ludilo. La tuta kamparo estis kiel damplato. Jam en la vilaĝo ni povis vidi la mondkonatan „Jungfraŭ“ kaj ĉiam denove ni vidis ĝin pli bone.

La aspekto estis neesprimeble grandioza. Vidante tiun belegan, grandiozan naturon, oni devas pensi je Dio, Kiu ĉion kreis kaj estias! Ni ne estis solaj sur tiu monto. Granda karavano iris supren per la ŝnurvagonaro, kaj estis jam longtempe supre kiam ni alvenis. Kelkaj estis jam foririntaj. Ni atendis, ĉar oni diris al ni, ke certe dum sunsubiro la Alpoj ruĝiĝos. Tion ni volis vidi kaj poste estis ankoraŭ tempo por malsupreniri. Ke la vespermanĝo bonege plaĉis, ne povus esti alie, ĉar la malsato estas la plej bona saŭco por gustumigi la manĝaĵojn.

En la kursalonego okazis granda koncerto kaj en la ĝardeno grandioza artfajraĵo je nia honoro. Tie-ĉi ni restis ĝis kiam alvenis la tempo por foriri Bernon. En Interlaken mi vidis ankoraŭ la ludbankon. Oni devigis nin forpreni la insignon de nia kongreso. Ne estis multe da ludantoj aŭ eble ludistoj, sed la ĉirkaustarantoj estis sufiĉe multnombraj. Tuj post kiam mi komprenis la ludadon mi foriris, ĉar tia ludado estas tute ne interesa por pensantaj homoj. La vagonaro, speciale por ni aranĝita ne estis sufiĉe granda por kunporti nin ĉiuj kune; granda parto devis atendi la sekvontan vagonaron.

Vere bonega propagando por nia movado estas tiuj ekskursoj. Estis jam la 29a de Aŭgusto kiam ni alvenis Bernon. Ĉi-tiun tagon ni ekskursis al la monto „Gurten“, ĉar mi intencis foriri el Bern jam la 31an kiam okazus la kumuna ekskurso al Gurten. Do, ni iris triope supren, Hungaro, Germano kaj nederlandanino, por ĝui la panoramon de Berno kaj ĉirkaŭaĵoj. La vetero ne estis sufiĉe hela, tial mi ne povis vidi la Alpojn. Do, ni malsupreniris kaj vizitis la konstantan lernejmuzeon, tiam la florigardenon kaj poste la balon. Tiu balo estis unu el la plej interesaj partoj de l'Berna kongreso, ĉar multege da personoj venis en naciaj kostumoj.

La konkurso literatura kiu okazis la 30an antaŭtagmeze estis ankaŭ interesa parto, precipe por ĉiuj kiuj interesiĝas pro la beleco kaj belsoneco de Esperanto.

Dum la vespero ni ĉeestis la diversajn amuzaĵojn, kiujn oni donis por la esperantistoj en la kongresejo. La gimnastoj vidigis nin vere artistajn numerojn, precipe la svinglado kun standardoj estis artiste farita kiel ankaŭ la svinglado kun torĉoj. La scenejo estis aranĝita kiel montaro. Flanke estis glitejo, kie la vizitantoj sin amuzis inter la diversaj aktoj. Ke la gejunularo sin tre bone amuzis estas kredeble, sed ankaŭ la aliaj partoprenis la glitsporton. Kaj nun baldaŭ finiĝus la belega kongreso. Dimanĉe la 31-an okazis la fermkunsido. La kongresanoj jam parte foriris hejmen, sed tamen estis ankoraŭ multe da personoj, precipe ĉar dum ĉi-tiu tago estus popolaj festoj kaj ekzercado de l'ruĝa kruco, ankaŭ alvenus flugisto. Ĉio okazus sur la monto Gurten, la plej alta pinto en la ĉirkaŭaĵo de Berno. Komuna tagmanĝo en la restaŭracio fortigis la ĉeestantojn. La svisaj polkantoj estis tre belsonaj. La popolludoj estas tute speciala sporto. Por adiaŭi la belan urbo Bern, ni faris

longan promenadon de Gurten tra „Gurtendorf” kaj „Wabern” al la urbo. Ĉi-tie ni lastfoje diris „adiaŭ” kaj „ĝis revido en Parizo”, ĉar la unuan de septembro mi fine forvojaĝis al Milano. Tie okazis la kongreso de l'italaj samideanoj. Jam diversaj el ili mi konis de l'Berna festo kaj ili atendis nin frate. Post Berno la vojaĝo ĉiam interesiĝis. La montaro ĉiam beligiĝis. Ni staris la tutan tempon antaŭ la fenestroj por ke nenio estu nevidita de ni. Ĉiam pli supren ni iris, preterpasante trifoje la saman lokon sed ĉiufoje pli alte. La tunelo „Loetschberg” malhelpis nin vidi ion de l'belega naturo; nur de tempo al tempo, por kelkaj momentoj, ni vidis naturbelaĵojn. Tre belega estis la tielnomita „blua maro”, tio estas lago tre malgranda kies akvo estas tiel blua kiel la itala firmamento. Post la „Loetschberg” ni preterpasis denove tunelon, ankoraŭ pli longan, nome la Simplon. Dum la vojaĝo tra la tuneloj ni sidiĝis por ripozi, ĉar ni, sciante ke la naturo en Italujo ankoraŭ estas tre vedinda, baldaŭ denove stariĝus antaŭ la fenestroj. Kiel impona, kiel grandioza estis la lago „Maggiore”. Bedaŭrinde la vetero malbeligiĝis; estas grandega pluvado kaj tial ni ne bone povis vidi la grandiozan belecon. Alvenante en Milano mi estis atenditaj de bonegaj esperantistoj kiuj donis al mi konfidindan hotelon, ion tre necesan en Italujo. Post refreŝiĝo ni eliris por manĝi en la urbo. Unue kompreneble al la „Duomo” t. e. la katedralo. Ĝi estis fermita, do, ni devis kontentiĝi pririgardante la eksterajn. Ni foriris por reveni la sekvontan tagon. En la galerio ni serĉis bonan sidlokon por ke ni povu prizorgi la internan homon. Nun komencis la serĉado por trovi la kunvenigon de l'italaj esperantistoj. Ni posedis la adreson sur la programo. Pensante ke ili jam delonge estus pretaj kun la vespermanĝo ni eniris por ĉeesti la postmanĝadan baliladon. Sed, ho ve! ni eraregis. La man-

ĝado nur komencis. Oni parolis je la bonfarto de ĉiuj kaj deklamis kaj kantis k.t.p. La vivado en Esperantujo estas vere tre amuza kaj tre frata. El niaj samhotelanoj mia sveda amikino kaj mi restis la lastaj kaj tial estis tute ne eble al ni sole trovi la vojon. Sed ne timu, la Italiandandoj ĉiam estas treege ĝentilaj por virinoj kaj precipe por fremdulinoj. Ili kondukis nin hejmen, klarigante al ni ion pri la belegaj konstruaĵoj kiujn ni preterpasis. Dankante mi adiaŭis ilin kaj supreniris en nian ĉambron. Nur unu tagon mi restis en Milano, do, jam frumatene mi ellitiĝis kaj preparis min por longa marŝado. La „duomo” estis la unua celo de nia promenado. Kiel dia estas tiu katedralo! Ĉiam kaj ĉie ni vidis statuojn, unuj pli belaj ol la aliaj. Statuo de sankta Bartolomeo estas la plej konata. Tiu statuo prezentas la sanktulon tute senhaŭto; li portas sian haŭton sur la brako.

Jam ĉi-tie ni povas admiri la riĉecon je marmora en Italujo.

Mi rondiris pilaron en la katedralo por iomete imagi la grandecon, kaj mi faris 22 paŝojn antaŭ ol mi estis rondiranta.

De la katedralo ni faris ankoraŭ viziton al aliaj preĝejoj. Ni ĉeestis sanktan Meson celebrita speciale por la katolikaj geesperantistoj. Ne estis multe da partoprenantoj; ni povis vidi ke ni estas en Italujo: ne multe da personoj en la preĝejoj kaj tute ne komencante je la fiksita horo. Ni tute trankvile atendis preskaŭ tutan horon kaj nun komencis la Diservo.

Post la sankta Meso ni iris en la sakristejon por sciigi kiuj el ni forirus al Romo.

Ni estis multaj, sed ne ĉiuj vojaĝus kune. Tiun tagon mi por la unua fojo manĝis tute laŭ itala kutimo. Mi timis fari tion, ĉar en Italujo la manĝado estas tute stranga por nederlanda ŝtomako. Ni komencis per ŝinko, kolbaso kaj pano, poste sardinoj kun pano kaj feliĉe butero, nun venis la

supo, nature legumsupo en kiu oni metis pudrigitan fromaĝon. Ho, kion fari! Mi tute ne kuraĝis manĝi tion! Sed la italaj fratoj certigis al mi ke tio estas bongusta. Mi faris do nur kiel la aliaj kaj enmetis ĝin en la supon. Post la supo mi manĝis viandon kun legumoj kaj terpomoj. Kian viandon mi manĝis mi ne povas diri, sed tion mi scias; se mi loĝus en italujo, mi neniam manĝus viandon; mi nur manĝus kukojn kaj fruktojn.

La kelnero alportis ankaŭ diversajn specojn da fromaĝo, inter kiuj la nederlanda al mi ŝajnis la plej bona. Nature mi manĝis ĝin kun pano, ĉar en italujo oni manĝas panon ĉiam. La plej bona alvenis laste, nome la fruktoj. Kiom bonege ili gustumis mi ne povas diri, mi nur povas konfesi ke mi manĝis pli da fruktoj ol de l'aliaj manĝaĵoj kune.

Tiun tagon la katolikoj aranĝis kunvenon en la episkopa palaco por propagandi nian movadon.

Ĉeestis multe da pastroj italaj. La alilandanoj salutis la italajn fratojn el nomo de siaj samlandanoj. Por Nederlando parolis la redaktoro de „Espero Katolika”. Li ĵus alvenis kaj haltis en Milano dum kelkaj horoj, vojaĝante al Roma kongreso. Mi ne atendis la finon de l'kunveno, ĉar mi volis viziti la urbon. Ni promenadis al la Milana kastelo, tramarŝis la urban parkon, pririgardis la triumfarkon kaj reiris al la urbo por prepari mian pakajon, ĉar la trian de Septembro jam tre frue mi devis esti al la stacidomo.

Mi sciis ke forirus vagonaro je la sepa matene, kun kiu ankoraŭ aliaj esperantistoj forvojaĝus. Do, mi prenis mian valizon, serĉis la vagonaron kaj tuj mi rimarkis mian samurbanon kune kun 2 aliaj nederlandanoj. Ni faris tre gajan vojaĝon, amuzante nin pri ĉio kaj nenio. Kion mi vidis mi tute ne plu povas remomorigi min, nur mi memoras ankoraŭ ke ni tagmanĝis en la vagonara restaŭracio, poste

fariĝis malsaneta, trinkis vinon kaj akvon por forigi la teruran varmecon kaj ke mi alvenis je la sepa vespere en Romo. Je la sesa ni jam ekrigardis por vidi la katedralon de sankta Petro, ĉar jam el tre granda malproksimeco ĝi estas videbla. Priskribi mian impreson kiam mi vidis tiun sanktejon estas tute ne ebla kiel estas ankaŭ nefareble diri la diversajn sentojn kiuj min estris dum la aŭdienco ĉe nia sankta Papo kaj la vizito de ĉiuj sanktejoj en kaj ekster la eterna urbo.

Do, pri tio mi ne plu parolu. Sur la Roma perono ni estis atendataj de gefratoj kiuj nin kondukis al nia hotelo, ne malproksime de l'stacidomo. Nun, mi estis tute en familia rondo, ĉar multe el la kongresanoj mi jam konis de longtempe. Kiel varmega, kiel fratema, kiel bonkora estis la akceptol! Ne, tio estas nur eble en Esperantujo, la plej bona kaj plej bela lando de l'tuta mondo.

F. v. Amelsfort.

Daŭrigota.

OFICIALA PARTO.

Ŝanĝoj en la anara listo ĝis la 15a de Novembro 1913a.

BUSSUM, „NIA PENADO“.

Novaj membroj:

F-ino Arnoldus p.a. S-ino Povel,
Gooilandsche weg 20.

F-ino A. Walstijn, Torenlaan 5.

„ Jacobs, Prinsenstraat.

J. v.d. Berg, Torenlaan 12.

C. Pijpers, Iepenlaan 20.

„ M. Majoor, Kerkstraat 11.

„ A. Kortbeek, Brinklaan 46.

„ D. Fokker, Prinsenstraat 6.

„ W. Mensink, Veerstraat 4.

„ Dieben, Brediusweg.

„ Dieben, „

S-ro Märckelbach, Kerkstraat.
„ Reesink, Brinklaan 190.
Wickman, Brinklaan 150.
Haakman, Nassaulaan 4.
v.d. Laan, Korte singel 9.

PETO!! Ni petas insiste al la Sekretarioj (inoj) de la unuigoj, ĉiam sendi la ŝanĝojn en la anara listo ĉiumonate antaŭ la 15-a al la ĉefsekretario de Nederlanda katoliko, S-ro H. B. van Zwet, Leeuwstraat 3bis Utrecht.

Saman peton al la favorantoj pri adresŝanĝoj.

Plendojn, pri la neregula ricevo de nia organo „Nederlanda Katoliko“ al la sama adreso.

Legrondoj

Ne prokrastu!

Kiel eble plej baldaŭ sendu vian poŝtmandaton por aboni al unu aŭ pluaj revuoj.

Skribu legeble vian nomon kaj adreson, kaj la nomon de la dezirata revuo sur la detranĉebla margeno.

Plej facile kaj plej regule estus, se ni povus komenci la abonon je la unua de januaro.

Tial: *ne prokrastu.*

Legprezoj:

Espero Katolika f 0,50 poĵare.

Esperanto f 0.50 poĵare.

Scienca Gazeto f 0.75 poĵare.

Adreso: P. A. SCHENDELER.
Maria Heide, Veghel.

ENLANDA KRONIKO

Groote Propaganda-vergadering in Bussum.

Op 28 October hield de Bussumsche R.K. Esperantistenvereniging „Nia Penado“, een propaganda-avond in het R.K. Vereenigingsgebouw al-

hier. Als spreker trad dien avond op de Weled. Gestr. Heer Kapt. v. Erp, voor ons esperantisten zeker geen onbekende. Als onderwerp had Z.Ed. gekozen: *Waarom esperantist.* In een geestdriftige, vaak met humor gekruide rede legde Z.Ed. de beweegredenen uit, welke hem geleid hebben tot werkzame deelname in de Esperanto-beweging, om daardoor ook zijne toehoorders op te wekken eveneens krachtig deel te nemen aan onze schoone beweging, die ten slotte toch ontzettend veel goed kan en moet doen aan de groote Katholieke zaak. Een dameskoor, leden onzer vereeniging, bracht op verdienstelijke wijze een viertal Esperantoliederen ten gehore, waaronder ook het esperanto-lied „Ni volas Dion.“

De propaganda-avond mag in alle opzichten goed geslaagd genoemd worden. Er gaven zich nl. 16 nieuwe leden op, zoodat onze vereeniging thans 50 leden telt. Dit jaar, te beginnen 10 November worden twee cursussen gehouden en wel een cursus voor 14 beginnenden en een herhalingscursus voor 14 leden.

Een woord van hulde komt zeker toe aan den Weled. Gestr. Heer v. Erp, aan wien dit mooie resultaat te danken is. Moge zijne gezondheid thans eene bestendige zijn, zoodat hij nog vele jaren met dezelfde geestdrift voor onze esperanto-beweging werkzaam zij. Een woord van dank en hulde aan den pionier onzer beweging den Zeereerw. Pater Linnebank, die door zijne lezing in 1912 hier gehouden, den grondslag legde voor onze vereeniging.

Zoowel de Zeereerw. Pater Linnebank als de Weled. Heer v. Erp mogen met trots neerzien op hun arbeid. Als trouwe soldaten zullen wij onzen Kapitein v. Erp, die onze geestdrift weder opwekte volgen, al is het dan niet in een bloedigen krijg, dan toch in den vreedzamen strijd voor onze Esperanto-beweging.

Esperanto in Amsterdam.

Op Zaterdag 8 November vergaderde de Amsterdamsche afdeeling van Nederlanda Katoliko, „Nia Kredo”. waarvan wij in het Dagblad *De Tijd* het volgende verslag lezen:

„Nia Kredo”.

Het bovenzaalje van het gebouw „Odéon” stond Zaterdagavond in het teken van het Esperanto. Daar was n.l. door de R. K. Amsterdamsche Esperantistenvereniging „Nia Kredo” een propaganda-feestavond georganiseerd. Vele Esperantisten, alsmede toekomstige beoefenaars dezer wereldhulptaal hadden door aanwezig te zijn blijk gegeven van hun belangstelling, zoodat tegen half negen de zaal geheel gevuld was met een beschaafd en goedgezind publiek.

Allereerst verscheen de heer A. W. van Oort, voorzitter der propaganda-commissie op het podium. Deze hield een aardige toespraak, waarin hij allen welkom heette, inzonderheid den voorvechter van het Esperanto, kapitein van Erp. Ten slotte wenschte spr. allen een gezelligen avond toe.

Het goed verzorgd programma werd alsnu vlug afgewerkt. Eerst trad een gemengd koor, onder leiding van den heer Leo Prins op, dat bij het auditorium veel succes had. Het koor vertolkte op waarlijk uitstekende wijze een tweetal liederen in het Esperanto. De nummers werden op de piano begeleid door den heer Eduard Koopmans Jr.

Hierna beklom kapitein van Erp, onder applaus der toehoorders, het podium tot het houden zijner lezing, getiteld „Waarom Esperantist”. Spr. begon met een woord van hulde te brengen aan de groote werkkraft van „Nia Kredo” en haar propaganda-commissie. Vervolgens wees hij er op dat het Esperanto van verschillende zijden wordt tegengewerkt, desondanks is het daadwerkelijk geworden onder

de talen der geheele wereld. Spr. zeide Esperantist te zijn, omdat hij soldaat is. In dit verband las hij een fragment voor uit een toekomst-roman bevattende een verhaal van een oorlog waarin ons land o.m. met Engeland zal worden betrokken. Hieruit bleek, dat het Esperanto goede diensten zou kunnen bewijzen in oorlogstijd.

Wanneer spr. geen soldaat was, zou hij Esperantist worden, omdat hij het geluk heeft een ouderwetsch katholiek huisgezin te bezitten. Spr. vindt het erg dat zijn kinderen reeds op de lagere school de beginselen van Fransch, Duitsch en Engelsch moeten aanleeren. Hoeveel gemakkelijker is het Esperanto, dat reeds 25 jaren bezig is door te werken in de verschillende lagen der maatschappij. De spraakkunst dezer wereldhulptaal bestaat uit slechts 16 regels, welke door eenieder in weinige uren kunnen geleerd worden. De bestrijders, die onze beweging willen remmen, — aldus spr. — willen niet zien dat het Esperanto-net voortdurend verdikt en vergroot; hoog aan den hemel staat thans de groene Esperanto-ster!

Kapitein van Erp is voorts Esperantist als Nederlander, omdat de buitenlanders ons „abracadabra” niet verstaan en de Hollandsche taal door hen wordt genegeerd. Spr. noemde daarom de tegenwerking welke het Esperanto hier te lande ondervindt, bekrompen, kortzichtig en echt Hollandsch.

Ook als Katholiek is spr. Esperantist, omdat het Esperanto een nieuw middel is om het Evangelie aan alle volkeren te verkondigen. Z.H. Paus Pius X heeft verklaard: „Esperanto gaat een groote toekomst tegemoet”. Onze godsdienst is internationaal, de priesters spreken een gemeenschappelijke taal, doch de leeken zijn scherp afgescheiden door de taal. Alleen een wereldhulptaal kan deze afscheiding wegnemen.

Nog herinnerde spr. aan het ge-

tuigenis van Z. Em. Kardinaat Van Rossum, dat Dr. Zamenhof's Esperanto groote diensten aan de Kerk zal bewijzen. Ook de anti-katholiek Jaurès heeft indertijd een jaloersch stukje geschreven over het goede voorbeeld der Katholieken in de esperanto beweging.

Het Esperanto zal een forsche kracht zijn — aldus eindigde spr. — ter overwinning voor Gods Kerk; daartoe moeten alle katholieken van Nederland medewerken. (Daverende toejuichingen).

De voorzitter bedankte kapitein v. Erp voor zijne hoogst interessante rede.

Het R. K. Dubbel-Mannenkwartet „Vita Nuova“ onder leiding van den heer Bern. Gransjean, hetwelk zijne belangelooze medewerking verleende, bracht vervolgens eenige mooie zangnummers ten gehore, welke telkens een welverdiend applaus inoogstten.

Ten slotte werd een zeer amusant tooneelspel in 2 bedrijven, getiteld: „Papa kent z'n Fransch“, schrijfster Mej. N. Boon, opgevoerd. Een woord van lof mogen wij den dilettanten niet onthouden voor het tactvol spel en de juiste wijze van uitbeelding, welke zij te zien gaven. Herhaalde malen wisten zij de lachspieren der toehoorders in beweging te brengen.

Wij vertrouwen dat deze welgeslaagde propaganda-feestavond niet weinig zal bijdragen tot de meerdere bekendheid van „Nia Kredo“ onder Amsterdam's katholieken.

Een Nieuwe Afdeeling in Oisterwijk.

Nauwelijks was het bekend, dat de 3de Esperantodag in 1914 zal gehouden te Oisterwijk, of aanstonds bleek dat te dier plaatse genoeg belangstelling voor de Esperantobeweging bestond om er eene afdeeling

van „Nederlanda Katoliko“ op te richten.

En dat dit reeds geschied is danken wij weer aan onze onvermoeide bestuursleden, de Eerw. Heeren Poell en Linnebank.

De Heer G. Nouwens leidde deze vergadering, die gehouden werd op Vrijdag 28 November om 8 uur des avonds.

Professor Linnebank sprak over de noodzakelijkheid eener wereldtaal, zette de taalregels van het Esperanto uiteen en vergeleek ze met die van eenige nationale talen om de gemakkelijkerheid der wereldtaal aan te toonen. Mede deed hij uitkomen de internationaliteit van Dr. Zamenhof's uitvinding en besloot met zijn indrukken weer te geven, opgedaan tijdens het Haagsche Congres.

Tijdens de pauze was er ruimschoots gelegenheid het tentoongestelde propagandamateriaal te bezichtigen.

De vergadering was aanvankelijk slechts bezocht door een twintigtal personen, doch na de pauze kwamen velen, die tevoren eene andere vergadering in hetzelfde gebouw hadden bij te wonen de lezing van den WelEerw. Heer Poell volgen. Deze zette in den breede uiteen voor wie de internationale taal dienstig en nuttig kan zijn, dat is dus voor velerlei groepen van menschen.

Het succes der beide toespraken was zeer bevredigend, vermits 21 personen zich als lid opgaven. Het voorloopig bestuur bestaat nog uit de heeren, die deze vergadering hebben voorbereid met den heer G. Nouwens aan het hoofd. Moge de Oisterwijksche groep spoedig in ledental aanwassen, moge zij stoere werkers bezitten: Haar is weggelegd een grooten stoot vooruit te geven aan onze beweging in 't zuiden. Haar arbeidsveld was aangewezen, te voren reeds: Den derden gewestelijken Esperantodag heeft zij te organiseeren,

die onze schitterende 6 Juli-betooging in Tilburg nog moet overtreffen.

F. van Amelsfort.

's-Hertogenbosch. De 's-Hertogenbossche R.K. Esperantistenvereniging heeft weder drie cursussen georganiseerd, waarvan een gratis voor werklieden.

Twee cursussen worden geleid door Mej. H. van Griensven, gediplomeerd met Diploma B, terwijl ook de derde cursus door iemand met diploma zal worden gegeven. Voor de 3 cursussen te samen hebben zich ongeveer 30 personen aangemeld.

's-Gravenhage. La katolika esperantisto klubo por laboristoj „Nia Sankta Kredo“ organizis la 23an de Novembro propagandan kaj samtempe festkunvenon en kafejo „Hollandais“. La salono estis tute plena.

Post bonvendo de la Prezidanto, sinjoro Ant. Massizo, la ĉeestintoj kune kantis „la Espero(n)“; tiam ricevis la parolvicon, nia estimata prezidanto de Nederlanda Katoliko, rev. Pastro Lamb. Poell el Tilburg, kiu en sia interesplena parolado klare montris, ke Esperanto estas utila, ebla kaj necesa por laboristoj. Aplaudado pruvis ke la aŭdantaro vere ĝuis la paroladon de la Rev. Pastro. Nun la ĉeestantaro kune kantis „Ni volas Dion“.

Post la paŭzo aŭdiĝis ankoraŭ la konata duo Sluis kaj Galjé el Delft, kiuj bone amuzis la publikon kaj ankaŭ ricevis laŭtan aplaudon.

„Nia Sankta Kredo“ certe kontentege memoros tiun sukcesplenan vesperon.

Jopo.

Esperanto-Examens.

De uitslag van de examens afgenomen vanwege de Ned. Esperantisten-Vereeniging: „La Estonto estas nia“ - op 29 Oct. te Arnhem is als volgt:

Diploma A; 21 cand. gesl. 18.

Mej. A. J. Bakker, Amsterdam; A. Borghouts, Roosendaal (N.B.); Mej. Th. M. Bruëns, Ootmarsum; A. J. Cavalja, 's-Gravenhage; C. Froweijn, Arnhem; J. V. Holleman, Roosendaal (N.B.); J. Ket, Arnhem; A. Kools, Oosterhout; B. v. d. Made, Boxtel; M. Moerman, 's-Gravenhage; P. Mulders, Esschen; B. Pors, 's-Gravenhage; A. P. v. Rijswijk, Uught; J. B. F. Smits, Rotterdam; Eerw. Zuster C. v. d. Ven, Nijmegen; H. de Winter, Arnhem; J. Woortman Rotterdam en J. Woutersen Utrecht.

Diploma C: 9 cand., gesl. 7. n.l.

Mej. J. J. Blom, Haarlem; Ph. M. A. Hardijzer, Rotterdam; J. v. d. Hout, Ootmarsum; C. Jacobs, Arnhem; C. H. Koopen, Rotterdam; J. de Vries, Utrecht en Mej. E. Weggemann Guldemont, Renkum.

De Voorzitter
der examencommissie,
J. v. d. VELDE.

De namen der katholieke Esperantisten zijn *cursief* gedrukt.

Zooals dus uit bovenstaande lijst weer blijkt plegen aan de Esperanto-Examens de katholieken flink deel te nemen. Al de geslaagden wenschen wij gaarne geluk met hun succes en hopen wij, dat het hun een aansporing mogen zijn, om zich met nog meer ijver op onze beweging toe te leggen.

Red.

Eksterlanda Kroniko.

Partopreno de esperanto ĉe la mondekspozicio en Leipzig, de W. Hahn.

Dum la venonta jaro la germana urbego Leipzig estos centro de la

esperanto-movado. Estas sufiĉe konata, ke tiu urbo posedas unu el la plej grandaj universitatoj de la tuta mondo, kaj pri la grandegaj mondfirmoj de la libroindustrio kaj eldonado oni aŭdas ĉiulande. En tia urbo, kiu pli ol alia partoprenas ĉe la mondkomerco, kiu havas la plej diversajn internaciajn rilatojn, la ŝatateco de esperanto estas tre grava. De kelkaj monatoj „*Saksa Esperanto Instituto*“ kaj la „*Reĝa Esperanta Biblioteko*“ estas ĝis nun ne superata de alia. En la bela publika legĉambrego estas elmetitaj ĉiuj konataj esperantaj gazetoj. La servanta oficisto havas la devon, alporti ĉiun libron aŭ gazeton, kiun oni deziras. La uzado estas tute senpaga, eĉ la prunteprenado por kelkaj semajnoj. La Reĝa Esperanta Biblioteko prezentas sekve vere idealan okazon, studi nian lingvon.

La jaro 1914 estos precipe grava por la esperanta movado en Leipzig. Jam nun oni preparas la internacian mondekspozicion por libroindustrio kaj grafikaj artoj. La plej multaj kulturacioj de la tuta mondo partoprenos oficiale la ekspozicion. Sur la „*strato de la popoloj*“ troviĝos apud la pavilonoj de la diversaj nacioj ankaŭ *esperanta pavilono* kiu enhavos ĉion, kio rilatas al nia movado, ekzemple la tutan esperantan literaturon, la kompletan gazetaron, prospektojn, katalogojn k.t.p. En speciala parto: „*Esperanto en la lernejoj*“, kie troviĝas skribaĵoj, tradukaĵoj kaj korespondaĵoj de la esperantaj lernantoj oni ekkonas la praktikajn spertojn de la esperantaj instruistoj. Per bona certa statistika materialo oni intencas propagandi. Tial mondkartoj estas desegnotaj sur kiuj tre legeble estos videblaj ĉiuj urboj kaj lokoj, kie ekzistas esperantistoj. Plej kompleta jarlibro enhavos ĉiujn grupojn kaj esperantajn asociojn, kiuj respondos la skribaĵon sendotan de la Saksa Esperanto Instituto. La esperanto-

pavilono en la mondekspozicio estos por nia movado efikega propagandilo, ĉar multaj miloj da vizitantoj per la rigardo devos konvinkiĝi, ke esperanto jam nun estas grava movado, kiun oni ne povas malestimigi. La esperanta popolo jam nun postulas sian spacon en la „*Strato de la popoloj*“.

Kelkaj aliaj partoj de la mondekspozicio uzas ankaŭ esperanton por siaj celoj, ekzemple la risorto por reklamafiŝoj. Per esperanto oni kolektas la ĉiuspecajn reklamafiŝojn en la diversaj landoj, kaj tiamaniere la praktika valoro de esperanto estas denove pruvata.

Ke pro la mondekspozicio ankaŭ la *Germana Esperanta Kongreso* okazos en ĉi tiu jaro en Leipzig, estas tre kompreneble. Sekve en la saksa urbego, kiu antaŭ cent jaroj estis la loko de grandegaj okazintaĵoj, esperanto ludos gravan rolon dum la jaro 1914.

La saksa Esperanto-Instituto, *Leipzig Dolzstrasse 1* treege dankas al ĉiuj gesamideanoj por la alsendo de ĉiuspecaj reklamafiŝoj. (nerompite!).

Deka Universala Kongreso de Esperanto

Paris. 2-10 Aŭgusto 1914. Paris.

Cirkulero 2a (1).

Por ke la „Deka“ bone sukcesu, estas nepre necese, ke la Organiza Komitato sciigu, kiel eble plej baldaŭ, pri la nombro de Kongresanoj.

Pro tio, tuj konigu al la Komitato vian aliĝon laŭ jena adreso:

Deka Kongreso de Esperanto

3, place Jussieu, 3

Paris, France.

Kune sendu vian kotizon per poŝtmandato, ĉeko aŭ transpagilo.

Atentu!

Ĝis la 1 de Junio 1914, tiu kotizo estos 15 frankoj (10 frankoj por familianoj: edzino kaj infanoj.)

Post la 1 de Junio 1914, tiu kotizo estos 25 frankoj (20 frankoj por familianoj).

Eĉ se vi ne estas certa, ke vi povos veni al la Kongreso, tamen tuj aliĝu, ĉar se vi ne ĉeestos, oni repagos al vi vian antaŭpagitan kotizon, deprenante nur unu frankon por oficejaj elspezoj. Sufiĉos, ke vi tion petos, sendante vian provizoran karton, antaŭ la 1 de Aŭgusto 1915.

Sekve, nenion riskante, vi ricevos grandan profiton, se vi aliĝos antaŭ la 1 de Junio 1913. Sed vi ricevos pli grandan profiton, se vi aliĝos kiel eble baldaŭ, ĉar la ĉiumonatan Kongresan Gazeton, ĉiu kongresano (escepte la familianoj) ricevos senpage nur depost la tago de sia aliĝo.

La unua numero aperos la 1 de Januaro 1914, kaj ĝin ricevos nur la Kongresanoj kies aliĝojn ni estos ricevintaj antaŭ la 31 de Decembro 1913. Ĉar ni presigos precize la sufiĉan nombron da ekzempleroj, al Kongresano kies aliĝon ni ricevos ekzemple en Marto, ni sendos la Kongresan Gazeton nur de la 1 de Aprilo.

Se vi havas presitan aliĝilon, uzu

ĝin por sendi vian aliĝon; tio estas preferinda, sed ne necesa.

La Organiza komitato de
la Deko.

(1] La cirkulero 1 traktis pri la Garantia Kapitalo kaj estas sendite nur al francaj samideanoj.

Esperanto en Bruselo.

La Federacio de la Bruselaj grupoj esperantistaj havas la plezuron sciigi ke la „senpaga informoficejo“ starigita sub la patronado de la komunuma administracio el Bruselo kaj lokata 19, passage du Nord, estas je la dispono de ĉiuj gesamideanoj kiuj, vizitante la belan, interesplenan belgan ĉefurbon, deziras iajn informojn (adresojn por loĝado aŭ pensio vidindaĵojn, k.t.p.)

Een Anglicaansche Esperantisten-Bond.

Wij lezen in „The British Esperantist“, dat in Engeland is opgericht een Anglicaansche Esperantistenbond, welke blijkens het artikel in genoemd blad uitstekend is georganiseerd.

H. J. BULTHUIS : Het eenvoudige leerboek der wereldhulptaal Esperanto. Prijs f 0,50.

2de, omgewerkte en verbeterde druk (3de-6de duizendtal.) Alom verkrijgbaar. Uitgave : VAN DER HAAR & VAN KETEL, den Haag.

Warm Aanbevolen.

„Aan alle Esperanto-beoefenaars zij dit leerboek warm aanbevolen“ aldus luidde de conclusie van „Boekenschouw“ over het Leerboek in het Esperanto door Majoor J. P. L. NIESTEN.

De prijs van dit volledig leerboek met opgaven en uitwerkingen, bevattende 275 bladzijden is f 1,50.

Esperanto Moerkerk Zegels.

Dit zegel is het meest artistieke onder de vele soorten Esperanto-Sluitzegels die bestaan.

Verkrijgbaar in den Boekhandel
en bij H. DAMEN St. Crispijnstr. 57, 'sBosch.

TOEZENDING FRANCO.

100 ex. f 0.15.

1000 ex. f 1.20

500 ex. f 0.65.

10,000 ex. f 8.—

VEREENIGINGEN GENIETEN KORTING.

ESPERO KATOLIKA.

Internacia monata gazeto.

Honorita per Apostola Beno de Pio X-a, 27-an de Junio 1906.

Oficiala Organo de Internacia Katolika Unuiĝo Esp. (I.K.U.E.)

Redaktoro : D-RO SMULDERS.

Administranto : S-ro F. SLEIJFFERS, Prins Hendrikstr. 93, Den Haag.

Machinale Fabriek van Houtbewerking
„DE MARK”.

Jac. van Groenendael, Bredà

Alle Timmerwerken, Speciaal in Eikenhout

- KERKBANKEN - KERKSTOELEN

SCHOOLMEUBELS, enz.

Stoomdrukkerij P. J. STRIJBOS HUIJBERS, Eindhoven.

